4-a Jaro. N-o 191 APERAS  SEMAJNE 31. Majo 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

FORTIGU NIAN ELDON-KOOPERATIVON!

Dum la periodaj eldonaĵoj de SAT regule aperadas kaj varbas por la ideoj de nia organizo, informas kaj interligas niajn membrojn, bedaŭrinde la eldonagado rilate al libroj konstante suferadas je la manko de sufiĉaj monrimedoj. Kompreneble oni ne devas forgesi, ke la ampleksa Jarlibro estas eldonaĵo, kiu ne pagiĝas per la kotizoj, kaj ankaŭ Sennacieca Revuo daŭre postulas monan subtenon, ĉar la abonmono ne kovras la kostojn de l' presado. Sekve lamas la eldonado de libroj.

Sed tiu stato ne devas daŭri. En nia Statuto ni trovas kiel unu el la taskoj de SAT, krei ĉu tradukan ĉu originalan literaturon, kiu spegulas la idealon de nia Asocio. SAT estas sufiĉe forta, por plenumi tiun gravan taskon en multe pli larĝa mezuro ol ĝis nun, kondiĉe ke ĉiuj membroj, komprenante la gravecon de la afero, helpus al nia kooperativo.

La **Literatura Komisiono** sciigis nin, ke jenaj manuskriptoj estas prespretaj kaj atendas la eldoniĝon:

1. **La vojo al Scienco de estonto,** de A. Fersman, vicprezidanto de Sovetia Akademio de Sciencoj, kun speciala antaŭparolo de la aŭtoro por la esperanta eldono. Tradukis K-do Rublev. Amplekso proks. 55000 literoj.

2. **La kosmopolita ideo,** elektita artikolaro pri historio, problemo, teorio, praktiko, estonto, de Prof. Hartwig, Prezidanto de la Internacio de Proletaj Liberpensuloj. Kolektiva traduko el germana sub redakto de K-doj H. Muravkin kaj V. Elsudo. Amplekso proks. 340 000 literoj.

3. **Kiel la homo formis sian dion.** De Edouard Simmel. Traduko el franca de M. Schnitzler. Proks. amplekso 120 000 literoj.

4. **Ruĝa Stelo,** utopia romano de A. Bogdanov. Kolektiva traduko de Odesaj SAT-anoj el rusa lingvo.

5. **Rakontoj pri kamparo** de Stefanik-Viniĉenko. El ukraina tradukis L. Ivn. Amplekso 64 pĝ. (Biblioteko de Sennaciulo.)

Krome estas kontrolataj dume la tradukoj de:

Ford aŭ Marks. La praktika solvo de la socia demando de J. Walcher (tradukis el germana K-do Frapviando). Amplekso proks. 290 000 lit.

Skizo de Ekonomia Geografio de J. F. Horrabin. Tradukis anoj de BLEA.

Krome la Komisiono havas sciigojn pri multaj aliaj manuskriptoj dume preparataj.

Aliparte, dum la tempo, antaŭ ol la sidejo de la Literatura Komisiono troviĝis en Odessa, jam estis kolektitaj kaj trarigarditaj manuskriptoj en Leipzig. El ili estas pretaj:

Fabeloj de Hermynia Zur Mühlen, traduko de Senheredigito. Amplekso de volumo de "Biblioteko de Sennaciulo". Facila, simpla legaĵo, taŭga por progresantaj lernantoj de nia lingvo.

La Fera Kalkanumo de Jack London. La fama romano de la talenta verkisto. Proks. 400 prespaĝoj. Tre eldoninda verko, kiun ni tiel longe devis prokrasti, kvankam ĝi jam estas tradukita de K-do G. Saville en jaro 1924.

Same ni devis malkuraĝigi la tradukanton de la romanoj de Upton Sinclair, K-don K. Fröding, kiu havas la specialan traduk-permeson de la konata aŭtoro por ĉiuj liaj verkoj. La Komisiono posedas kelkajn ĉapitrojn el la ampleksa verko **La Ĝangalo** (The Jungle), kiuj estas bonstile tradukitaj kaj certe indus baldaŭan publikigon per la SAT-kooperativo.

Krome ni povas perfidi al nia Legantaro, ke ni intencas eldoni **SAT-anan Krestomation,** legolibron, kiu konsistos nur el originaloj verkitaj de SAT-anoj, kaj en kiu troviĝos elektitaj pecoj el sennacieca literaturo. Jam nun K-dino estas okupita pri elektado kaj kompilado, por ĝin tre baldaŭ pretigi. Sendube multaj K-doj ĝin bonvenigos plezure!

Pri alia projekto de interesa verko, kiun ni intencas aperigi, vi trovos pli sube alvokon de la Lit. Komisiono. La verkokapablaj K-doj en SAT ne hezitos pruvi sian lertecon. Temas ja pri eldono de sufiĉe ampleksa kaj profundsenca **Utopia Romano,** kun varba, agiteca tendenco por nia ideo, kies eldono por nia movado havus grandan signifon.

Nu, ni preskaŭ forgesis, ke K-do G. de Bruin kun la helpo de K-do Sneĵko nun prilaboras la verkon: **Historio de la Laborista Esperantista Movado,** kiu kompreneble ankaŭ staras en nia eldonplano de plej proksima tempo.

* * *

Laŭ tiuj informoj vi vidas, K-doj, ke ne mankas bonega literaturo, kiu estas vere eldoninda kaj povus tuj esti

eldonata, se nia membraro mem montrus pli da intereso por sia kooperativo, subtenante ĝin.

La K-doj povos plivigligi nian eldonagadon en diversa maniero: Ili havas la eblecon, trarigardi nian libro-katalogon, elekti, kion ili deziras legi, kio mankas en ilia kolekto da libroj, kaj mendi ĉe nia Administrejo. Tiele ili ne nur havigas al si utilan legaĵon, sed ankaŭ treege helpas al nia kooperativo, kiu plimalgrandigas sian stokon da libroj kaj pligrandigas sian provizon da fluida mono.

Kiu jam posedas la SAT-eldonaĵojn komplete, aŭ kiu ankoraŭ ne riskas aĉeti ilin, pro ne-jam-sufiĉa scipovo de la lingvo, tiu povas efike helpi, aĉetante la **akciojn** de la kooperativo. Ekzistas du specoj da akcioj:

Serio **A** — por unu dolaro (gmk. 4.20 aŭ ekvivalento),

Serio **B** — por duona dol. (gmk. 2.10 aŭ ekvivalento).

Sed kompreneble ankaŭ pli malgrandaj monsumoj estas bonvenaj. Ilin ni kvitancos en "S-ulo" sub "Municio". Kiu pagas en la "Jubilea Ĉeno" aŭ estas "Fera Gvardiano", ne malpli rekte subtenas la financan bonstaton de nia Asocio kaj de ĝia eldon-kooperativo.

Nenia halto estu en nia movado, neniaj prokrastoj en la disetendiĝo de nia aparato, laŭ regula ritmo ni paŝu antaŭen! K-doj-SAT-anoj, **per ĉiuj viaj fortoj helpu en la plenumado de la plej grava nia tasko, garantiu la libro-eldonadon per subteno de la Eldon-Kooperativo!**

DIREKCIO DE SAT.

PRI UTOPIA ROMANO

Konkurso! Al K-doj literatur-amatoroj!

La Literatura Komisiono de SAT deziras havi en sia paperujo por posta presigo bonan utopian romanon (aŭ novelon) originale verkitan en esperanto. Tiu ĉi verko ne tro ampleksa laŭ enhavo (proks. 100—150 000 literoj) devas plenumi jenajn kondiĉojn:

1. La verko estu dediĉata al la triumfo de la mondlingvo, ĉar la celo de la verko estas: a) doni originalan, entuziasmigan, novan legaĵon al niaj movadanoj; b) tradukinte la verkon nacilingven, ricevi a l l o g a n kaj trafan propagandilon por nia movado.

2. La verko estu utopia, t. e. la tempo de agado estu ne nuna, sed estonta.

3. La idea kadro, la idea fono de l' verko estu la ĝenerala progreso de l' klasbatalo kaj kultur-tekniko (radio-kino, radio-universitatoj, fono-kino k. s.). Do la tempo ne estu tre malproksima de ni (ne en jaro 3000, sed prefere en la nuna 20-a jarcento.

4. En la verko inter aliaj problemoj estu forte substrekataj la progresoj de la lingvo esperanto. Estu priskribataj ĝiaj aplikoj kaj profit-donoj: a) facilaj interproletaj interrilatoj; b) facilaj migro- kaj vojaĝ-eblecoj; c) ebleco studi ĉiulande; ĉ) kolos-eldonkvantaj gazetoj, libroj, revuoj; d) kolosaj kultur-organizoj (bibliotekoj, universitatoj); e) forte akcelata emancipa movado de l' Proletaro ktp. ktp.

K-doj, ĉu vi deziras helpi al efektiviĝo de tia romano? Se jes, sendu al ni viajn detaligitajn projektojn (1000 ĝis 3000 literojn). En viaj projektoj skizu la intrigon de la verko, ĉefajn heroojn, kaj donu mallongan enhav-priskribon (kiel "scenarion" por kino).

El la alsendotaj projektoj ni elektos la plej interesan. Poste ni publikigos la rezultojn de nia konkurso, kaj post kelka tempo nia Legantaro havos bonan romanon.

Literatura Komisiono de SAT.

Adreso: O d e s s a, Kazarmen. per. 7, al S. Rublev.

R i m. Dume vi ne verku la tutan romanon (novelon), sed sendu nur skizojn. Post nia elekto de la plej taŭgaj skizoj ni proponos al iliaj aŭtoroj verki jam romanon (ĉu individue, ĉu kolektive).

"DUA MANĈESTR"

Ivanovo-Voznesensk, nomata "Dua Manĉestr" de Sovetio, estas nova urbo. Ankoraŭ antaŭ sepdek jaroj sur ĝia loko estis du vilaĝoj, Ivanovo kaj Voznesenskoje, dividitaj per rivereto Uvod. La vilaĝoj apartenis al princo Ĉerkaskij, kiu donis ilin kiel doton kun filino al grafo Ŝeremetev. Ĉar tiu lasta estis riĉega kaj ĉiam loĝis en Moskvo, tial liaj kamparanoj vivis, kompare, pli feliĉe ol aliaj. Multaj inter ili, pli entreprenemaj, elaĉetiĝis al libero. Malbona grundo kaj proksimeco de komerca urbo Moskvo devigis la loĝantojn de la vilaĝoj serĉi aliajn fontojn de ekzisto. Tiel naskiĝis en vilaĝo Ivanovo malgrandaj fabriketoj, en kiuj laboris mastro mem kun sia familio. Oni konstruis la fabrikaĉojn apud la rivero, kiu donis al ili malkaran akvon. La unuaj estis teksaj fabriketoj, poste sekvis koloraj kaj finpretigaj kun mana pretigo. Unu fabriketo Ŝĉudrov ĝis hodiaŭ ekzistas kaj konserviĝas kiel maloftaĵo. La vilaĝo Ivanovo kelkfoje brulis, kaj restis nur sendifekta unu sonorilejo, konstruita dum tempo de caro Ivano la Fulmotondra en 15-a jarcento. Ĝi ankaŭ konserviĝas kiel antikva monumento.

Ĉirkaŭ Ivanovo-Voznesensko estis grandegaj arbaroj. Kiam fervojo ankoraŭ ne ekzistis, la komercistoj veturis Moskvon kaj Niĵni-Novgorodon per ĉevaloj. En arbaro ilin atakis senlaboruloj, venĝantaj sin pro malbona trakto al laboristoj. La plimulto el la fabrikistoj estis iamaj bienservistoj, kiuj akiris profitan staton, priŝtelante siajn bienulojn. Multaj el la unuaj fabrikistoj ruiniĝis kaj cedis la aferojn al aliaj pli entreprenemaj personoj. La laboristoj laboris komence 16 horojn, poste 12 kaj fine, antaŭ la Revolucio, 10 horojn ĉiutage. Ili loĝis kiel bestoj en malgrandaj domaĉoj, 15 homoj en ĉiu loĝejo, precipe en la ĉirkaŭaĵo de la urbo. Samtempe la mastroj loĝis en luksaj palacoj kaj dronadis en pompego. Malbona salajro, monpunoj kaj hunda vivo devigis la laboristojn postuli de la fabrikestroj pli bonan ekziston.

La unua granda ondo de strikoj pasis en 1905. Sed la fabrikestroj ne cedis al la laboristaj postuloj, sed alvokis soldatojn kaj kozakojn, kiuj rigore atakis la strikantojn. Tiuj lastaj venĝis sin bruligante la somerdomojn de la entreprenistoj. Post kelkaj monatoj fine la fabrikestroj devis konsenti pli favorajn laborkondiĉojn al la laboristoj.

Dua striko okazis en 1915, pro malsufiĉo da nutraĵoj kaj ilia multekosteco. La laboristoj el ĉiuj fabrikoj kune kun la oficistoj de l' tuta urbo marŝis al placo por postuli salajran aldonon kaj panon por la familio. Iliaj gvidantoj estis arestataj. Sekvantan tagon ili marŝis por liberigi siajn K-dojn el malliberejo. La soldatoj baris la vojon. La laboristoj petis ilin ne malhelpi ilian aferon. Kiam la laboristoj daŭrigis marŝi, oficiro ordonis al la soldatoj pafi. El la popolamaso 20 homoj estis mortigataj kaj multaj vundataj.

La fabrikestroj samtempe estis mastroj de la urbo kaj en la urbkunveno malmultege zorgis pri la bonstato de la urbo. Ili verŝis en la riveron Uvod restaĵon de koloroj. La malbona akvo fiodoris kaj malutilis al la kamparo. La stratoj estis nepavimitaj kaj prezentis dum seka tempo dezerton Saĥare kun fluganta polvo. La plej malgranda pluvo aliformigis ilin je marĉo. Nur en centro oni lumigis la stratojn. Por promeno ekzistis unu ĝardeno kaj du bulvardoj. Laboristaj kluboj ne ekzistis, sed unu teatro kaj du kluboj por la riĉularo kaj la ĉefoficistoj.

En 1913 la urbo havis 100 000 loĝantojn, grandparte ili estis teksistoj. Estis 20 fabrikoj, teksaj, ŝpinaj, kalikotpresaj k. a.; krom tio 12 alispecaj (rimenaj, kemiaj, metalmuldaj ktp.). Nun la urbo havas jam 160 000 loĝantojn.

La Revolucio de 1917 plene ŝanĝis la urbon. Dum la civila milito kelkaj fabrikoj frostiĝis. Ili estis riparataj kaj funkciigataj. En 1918 la urbo fariĝis gubernia centro. Ĉiuj laboristaj dometoj ricevis elektran lumon. La akvokondukejo anstataŭis la putojn. En du malnovaj fabrikoj oni aranĝis vaporbanejon por 3000 homoj tage en ĉiu. Aperis kuireja fabriko, preparanta 10000 tagmanĝojn kaj provizanta preskaŭ ĉiujn fabrikmanĝejojn. En la urbo estas aeroplanejo, radiostacio kaj 15 aŭtobusoj. La stratoj laŭgrade estas pavimataj per ŝtonoj kaj asfalto. La urbo aranĝis tramon por transportaĵoj, kaj baldaŭ veturos tramo por homoj. Sed konstruo de du ferpontoj trans la riveron malhelpis ankoraŭ ĝian aperon. La rivero fluos en granitaj bordoj. La malpura akvo el fabrikoj malsupreniros en specialaj tuboj, sed ne en la riveron. Kelkaj trietaĝaj domoj estas konstruataj en tiu ĉi printempo por Politeknika Instituto transveturigita en jaro 1916 de Riga. Same oni konstruas tiuĉi-jare buĉejon. Fervoja varstacio estas multe plilarĝigata, ĉar la kvanto da ŝarĝoj plimultiĝis. Ĉiuj komercaj entreprenoj troviĝas en la manoj de "Ivgum" kaj "Kooperativ EPO", el kiu la unua havas 25, la dua 75 diversajn magazenojn. Ambaŭ vendis en 1927 varojn por 30 milionoj da rubloj.

La laborantoj por kulturaj aferoj havas multajn bonegajn klubojn. Krom Popoldomo kaj Laborista universitato ekzistas klubo ĉe ĉiu fabriko kun rondetoj, scenejo kaj kinematografa aparato. Krom tio ĉiu profunuiĝo havas siajn klubojn, kaj en la Palaco de Laboro estas salono por lekcioj kaj kunvenoj. Du ĵurnaloj aperas en la urbo, "Laborista Rando" kaj "Juna Teksisto", kiuj ofte enhavas esperantajn leterojn kaj artikolojn.

Anstataŭ kelkaj netaŭgaj fabrikoj, trustoj konstruis 2 novajn ŝpinfabrikojn, ĉiu por 3000 laboristoj. Tri domoj centloĝejaj kaj du laborist-vilaĝoj estas konstruitaj. Ĉiu el tiuj laboristaj dometoj havas tri fenestrojn en la fasado. La urbo ĉiujare kreskas je larĝeco kaj alteco.

V. Makarin (11 220).

efikas al la kreskaĵoj, ĉar ili nur vegetadis sur la altaĵoj.

Transpaŝante la vastan ebenaĵon ni preteriris multcentajn diversspecajn brutarojn: ĉevalojn, bovojn, azenojn kaj porkojn. La pli aĝaj rigardis nin preskaŭ sentime, dum la pli junaj gracie forgalopis.

Sekvante iun valeton, kie serpentumis torento, ni venis al plantejeto, kie loĝis en simpla kabano ĉino kun sia familio. Estis kvin homoj, kiuj ŝajne vivis feliĉe kune kun siaj dombestoj en la nekulturita duondezerta izolejo. Kio pelis ilin tien multe for de l' naskolando, for de ĉia komforto kaj civilizeco? Mi ne scias.

(Daŭrigota.) Muri.



Fervojista senlaboreco en Samara

Letero speciale verkita por "S-ulo" de la organiza fakestro ĉe la Komitato K-do Jerligin kaj de la estro de fervojista senlaborula sekcio ĉe Samara laborborso K-do Nikitin.

Samara Distrikta Profunuiĝa Komitato de gefervojistoj ("Uĉkprofsoĵ") unuigis la 1. jan. 1928 — 13 056 membrojn de l' profunuiĝo, el kiuj 2421 estas senlaboruloj. Unuavide la kvanto da senlaboruloj ŝajnas tre granda, sed se oni konsideras la grupojn, el kiuj konsistas tiu nombro, oni konstatas, ke la pli granda duono konsistas el simplaj gelaboristoj kaj kontorpersonaro. Al kvalifikitaj laboristoj apartenas nur 16 ĝis 17% el la ĝenerala kvanto da senlaboruloj.

Se oni konsideras kaŭzojn de la maldungo, aĝon, longdaŭrecon de dunglaboro, oni konstatas, ke iuj senlaboruloj maldungiĝis laŭ propra deziro. Inter la senlaborularo superas la gejunuloj en aĝo ĝis 25 jaroj, kiuj aliĝis al la profunuiĝo dank' al provizoraj laboroj, tamen ne laboris en la fundamenta personaro de produktantoj; plie alvenintoj el vilaĝoj aŭ maturiĝantaj membroj de laboristaj familioj, kiujn entiri en la produktadon ne estas eble ĝis pli granda plilarĝigo de la industrio.

Dua grupo el senlaboruloj, inter kiuj superas la kontorpersonaro, estas membroj de familioj, en kiuj laboras unu aŭ du aliaj familianoj, tielnomataj "serĉantoj de laboro", estintaj ne efektivaj senlaboruloj.

Kiaj rimedoj do ekzistas en Sovetio, por helpi al la senlaboruloj? **Socia asekuro,** t. e. protektado de senlaboruloj, kiuj pli frue estis dungitaj. **Profunuiĝoj,** helpantaj al senlaboraj membroj kaj **Ŝtata subvencio:** sociaj laboroj, laborkolektivoj, socia nutrado, senpaga loĝejo kaj aro da privilegioj ĉe pago por komunumservoj (loĝado, akvo, veturado al aliaj lokoj k. c.).

La distrikta fervoja asekurkaso helpis

VOJAĜAJ IMPRESOJ EL SUDA AMERIKO

II

Estis varmega tago, sennuba ĉielo kaj la suno ĝuste super ni tiel vertikale, ke ni ne havis ombron. Pezan ŝarĝon ni portis, akvon kaj manĝon krom aliaj necesaj objektoj. La ŝvito fluis, kaj ofte ni devis ripozi.

La tero, kiu nun estis malpli ŝtonriĉa, havis ruĝan koloron, cindro el vulkana deveno. La tereno estis tre malebena, kaj la arbustaro fariĝis des malpli densa, ju pli alten ni venis. Kelkajn arojn da duonsovaĝa bruto ni vidis, sed ili forkuris, kiam ni alproksimiĝis.

Post 4-hora laciga irado ni atingis la plej altan pinton, sep mil metrojn super la marnivelo, kaj aperis neforgesebla grandioza panoramo. Ĉie en la horizonto la senfina ondeganta maro. Okcidente la suno jam tuŝetis la maron, kaj la ĉielo ŝajne brulegis. La flamoj etendis sin tra la spaco en multkoloraj nuancoj, kaj oriente aperis la unua ora stelo. La taga spektaklo estis je sia fino. Antaŭ niaj piedoj etendiĝis verde vasta ebenaĵo, kie paŝtis trankvile centoj da sovaĝaj brutaroj. Mutaj, senmovaj ni kvar K-doj staris tie dum momento admiris tiun vidaĵon, ĝis malvarmeta vespera vento rekonsciigis nin.

Ni komencis tuj kolekti sekajn branĉojn por ŝtiparo kaj ordigi noktan restadejon. Subite kiel signon de atentigo iu K-do flustris mallaŭte kaj fingromontris al plektaĵo apenaŭ dek metrojn for de ni. Tie aperis aro da sovaĝaj porkoj nigraj, kiuj en la sama momento observis nin. Pafo ekfulmis, kiu finis la vivon de porkido, el kiu ni sur la ŝtiparo preparis bongustan noktomanĝon.

Mi akceptis vicon gardostari, kaj baldaŭ la K-doj kuŝante ĉirkaŭ la ŝtiparo ronkadis. Serena estis la tropika nokto. La nokta migranto, la plenluno, faris sian arkan vojaĝon trans la firmamenton kaj arĝentumis la maran supraĵon. Ensorĉa estis tiu horo, kaj mi transiris mondon, kie vortoj ne sufiĉas por priskribi la sentojn. Ĉirkaŭ mi susuradis miloj da akridoj, kiuj nun vokis la aliajn pro la sankta amo. De tempo al tempo aŭdiĝis ankaŭ inter aliaj sonoj spiregoj, flaradoj de sovaĝaj brutaroj en la proksimeco.



San Kristobal

Sur la altaĵoj. Malantaŭe trankvile paŝtantaj sovaĝaj ĉevaloj.

Post nelonga deĵoro mi devis cedi pro la atakoj de dormemo kaj tute refortigite post dormo komencis la tagon, esplorante la ĉirkaŭan terenon. Estis videble, ke ni tranoktis sur kratero jam delonge estingita. La mola tero senŝtona havis ruĝan koloron kaj evidente entenis ŝtofon, kiu malbon-

(stato de 1. 1. 28) al 1144 personoj, kiuj ricevadis en la unua grupo monhelpon de 16 rubloj pomonate (189 personoj aŭ 16%), en la dua grupo 12 rbl. (197 pers. aŭ 17%), en la tria 10 rbl. (758 pers.). Senlaboruloj havantaj familion sen enspezoj, ricevas por nelaborpovaj familiaj membroj alpagon, por unu persono de 15%, por du pers. — 25%, por tri kaj pli — 35% de la fundamenta monhelpo. Inter la senlaboruloj cititaj 241 ricevis alpagon por unu persono, 83 por du, 75 por tri, sume do 399 personoj, dum 745 ricevis nenian alpagon, kio konfirmas nian konstaton, ke la plimulto el la senlaboruloj havas laborenspezon en la familio aŭ estas soluloj.

Dua speço de helpo estas la subteno per la profunuiĝaj organizoj; sed dank' al la granda helpo flanke de la ŝtato la profunuiĝa helpo ĉe ni ne estas granda. La profunuiĝoj elspezas siajn monrimedojn ĉefe por la kulturkleriga laboro inter la membraro. De tiu organizo estis helpataj (1. 1. 28) 453 personoj.

La ĉefa subteno por la senlaboruloj venas de la ŝtato per la supre cititaj servoj. Laŭ la buĝeto de Sovetio por 1927/28 por lukto kontraŭ la senlaboreco estis asignataj 148 milionoj da rubloj.

Esperantigis B. Jeleznjakov (5583).

SAT-anoj!
En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

Pri instruado en Polujo

En ĉiuj lernejoj de Polujo, escepte de la universitatoj, la instruado subiĝas al la influoj de l' pastraro. La religia instruo estas deviga. Sekve, ĉiudimanĉe la geinstruistoj devas konduki la lernejan junularon al preĝejo. Trifoje ĉiujare oni devigas la lernantaron konfesi "pekojn" kaj akcepti la komunion. Ĉiutage antaŭ kaj post la instruo oni en lernejoj devas paroli la komunan preĝon, rekomenditan de preĝejestraroj.

La koncernaj ordonoj pri la suprecitataj rimedoj de la religia "eduko" estas vere kontraŭaj al la pola konstitucio, en kiu oni diras (artikolo 112), ke "neniu povas esti devigata por la partopreno ĉe la religiaj okupoj aŭ ritoj, se li ne subiĝas al gepatra aŭ kuratora estraro".

La citita frazo el la konstitucio donas nur al la gepatroj la povon devigi por la religiaj ritoj, dum oni ĉi tie senleĝe ordonas al la instruistaro alpreni la gepatrajn rajtojn:

"En ĉiujara buĝeto de ĉiu mezlernejo oni difinas iun kvoton por religiaj bezonoj" — tiel ree parolas la leĝo. Aliflanke la registaro ne zorgas, ekzemple, pri la teknika provizo de la lernejaro, precipe de elementaj lernejoj: — por unu elementa lernejo, *j a r e*, oni difinas la ridinde malaltan sumon de 18 zlotoj (*d u d o l a r o j*) por la instru-helpaĵaro.

Tiel "zorgas" la burĝa registaro pri la lernejoj.

Karolo Krulikovski.

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas junulo havanta dudek jarojn. Mia profesio estas elektristo. Sed nun mi ne plu estas okupata profesie kiel elektromuntisto. Antaŭ unu jaro mi fariĝis laboristo en ĉefpoŝtejo de nia urbo. Mia laboro estas dum somero, disporti leterojn, kaj dum vintro, hejti la vaporhejtejon. Ĉar estas vintro, dum mi skribas mian "tagon", mi priskribas la duan okupon.



Kiam ankoraŭ ĉiuj homoj kaj bestoj dormas, mi jam komencas je la kvina horo mian deĵoron. Ekbruliginte la fajron en la vaporkaldronoj, mi hejtas la ĉambrojn ĝis la dekunua horo antaŭtagmeze. Tiam sekvas mallonga ripoztempo, kaj poste ĝis la dua horo posttagmeze mi faras diversajn malgrandajn laborojn. Je la dua estas laborfino. Entute mi laboras tage ok horojn. Je la tria mi estas hejme, tagmanĝas kaj legas ricevitajn leterojn aŭ gazetojn de eksterlandaj esperantistoj. Posttagmeze mi iomete dormas. Vespere, irante al miaj amikoj (SAT-anoj) aŭ socialistaj partikunvenoj, mi studas por mia scio en socialismo kaj por perfektiĝi en nia bela lingvo esperanto.

Linza SAT-ano (7387).

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

PROVSTUDO

(Daŭrigo dudeksesa)

Sendube la kaŭzoj de tiu milito estis ekonomiaj; temis scii ĉu Germanio venkos definitive sur la mondmerkato; ĉu la Brita Imperio konservos sian superregadon. Sed, ĉu estus ebla tia kruela buĉado kaj stulta detruado, se la homojn ne frenezigus la patriotismo? se la simplaj proletoj kaj kamparanoj ne estus trompataj per la edukado? Certe ne. Tial unu el la plej urĝaj kaj gravaj taskoj estas kontraŭbatali kaj ĝisradike detrui la patriotan ideologion.

La lasta mondmilito apartenas al la kategorio de regresaj militoj. Ĝi ja ne havis kiel rezulton plilarĝigi kelkajn naciojn kaj detrui aliajn. Male, el la forfalo de la aŭstra kaj rusa imperioj naskiĝis aŭ reviviĝis malgrandaj nacioj. Tial la politika ekvilibro en Eŭropo estas tre ŝancela, provizora kaj donas al la kapitalistaj gvidantoj tiom da zorgoj kaj klopodoj. La packontrakto de Versaj estas ega sensencaĵo; ĝi ignoras la ekonomiajn leĝojn, kaj oni ne bezonas esti profeto por antaŭdiri, ke ĝi baldaŭ fariĝos tute kaduka. La malgrandaj politikaj unuoj kreitaj de la registaroj de "Entente" ne havas vivkapablecon. Cetere, ĝis nova milito okazos por starigi pli firman kaj racian ekvilibron, la sendependeco de Estonio, Latvio, Litovio, Hungario, Rumanio, Bulgario kaj ceteraj similaj ŝtatetoj povos esti nur ŝajna, formala. Fakte ili estas sub la financa dependeco de la grandaj ŝtatoj. Sed la burĝaro de tiuj nacietoj ludas rolon; ĝiaj reprezentantoj okupas bonajn postenojn, ĝuas honorojn kaj sekve havas intereson en la konservado de la nacia sendependeco.

Sed ĉu la laboristoj el tiuj "sendependaj" landoj profitas je tio? Ĉu ilia sorto estas pli bona ol antaŭe? Al tiuj demandoj elokvente respondas la faktoj. Neniam antaŭe ekzistis tie pli da senlaboreco, pli da mizero; neniam antaŭe la tieaj laboristoj estis malpli liberaj. En la "liberaj" nacioj regas diktaturo kaj teroro; la malliberejoj kaj karceroj estas plenplenaj. Ĉiuj laboristaj gazetoj raportas abunde pri la persekutoj, ekzekutoj kaj fimortigoj al laboristoj postulantaj pli bonajn vivkondiĉojn.

En Italio, kie la naciismaj principoj estas plej severe aplikataj, kie la patriota ideologio estas plej laŭdata, plej entuziasme akceptata, la klaskonscia Laboristaro estas pli kruele traktata ol ĝi estus, post nacia malvenko, sub la regado de fremdaj estroj. La ekzisto de faŝista diktaturo estas fakta argumento plej bona por pruvi, ke la patriotismo spegulas nur la interesojn de la burĝa klaso.

La postmilita historio de la sendependiĝintaj nacioj estas ĉiupaĝe verkita per la sango kaj martiriĝo de la proleta klaso. La konsento flanke de proletoj partopreni en la t. n. liberiga nacia milito estas la plej granda mistifiko, la plej senskrupula trompo, kiun oni povas prezenti al si. Tia fakto estus neklarigebla, se oni ne scius pri la religia esenco de l' patriotismo.

Kun Lenin ni konkludos: "Defendi la patrion, tio signifas defendi kelkajn kapitalistojn kontraŭ la atakoj de aliaj[52]) . . ."

Karl Marks diris, ke la proletoj ne havas patrion. Bedaŭrinde, jes, ili havas; tiu ento[53]) ekzistas en ilia spirito. Oni ofte povas konstati, kiom laboristoj fieras pri sia nacio, kiom

[52]) Citita de N. N. Soukhanov. Rememoroj pri la Revolucio en 1917.

[53]) Tuto de la ecoj, kiuj konsistigas la esencon de estaĵo.

Forkuro el la "fremdula legio"

El la multaj rakontoj de forkurintoj el la konata "franca fremdula legio" ni sciigas unu laŭ priskribo en "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo). — Du amikoj, ambaŭ eks-soldatoj, lacaj post du jaroj da senlaboreco, decidis serĉi feliĉon en respublika lando. Do ili konsentis kontrakton pere de franca konsulo, por servi en la fremdula legio. Oni promesis al ili 10 frankojn tage kaj multajn aliajn favorojn. Post mallonga tempo ambaŭ troviĝis en Afriko, kaj unu fariĝis bakisto ĉe la unua bataliono de la tria regimento. La alian oni vicigis en la trian batalionon de la sama regimento, sed al li la sorto ne estis favora. Oni laborigis lin kiel malliberulon de mateno ĝis nokto. Sed la plendoj de ambaŭ estis samaj: malbona manĝaĵo, nesufiĉa ripozo kaj netolerebla vivo pro senĉesa pluvado. Ankaŭ ili trovis, ke la pago estas tre malproksima de 10 frankoj tage. Efektive ĝi atingis la altan sumon de 25 centimoj!

Kune kun iu irlandano en 1926 unu provis forkuri de Sidi Bel Abbes, sed ne sukcesis. Ambaŭ estis kaptataj kaj ricevis 25-tagan punon kun la "Peleote", kio signifas, ke ili devis porti sakojn dorse, plenigitajn per sablo, kiuj pezis 30 kg. Se ili haltis, por trinki akvon, ili ne ricevis manĝaĵojn dum tiu tago.

Fine niaj du glorserĉintoj decidis denove forkuri. Kun iom da pano, sed neniom da mono la du amikoj malaperis dum malhela nokto. En la tria nokto malsato kaj malvarmo devigis ilin eniri araban vilaĝon, kie ili ŝanĝis kelkajn vestaĵojn por araba pano nomata "caserah". Arabo alveninta sciigis ilin, ke franca patrolo estas en apudeco, kaj ili devis denove sin kaŝi. Kiam la danĝero estis pasinta, ili lace daŭrigis la piediradon kaj, antaŭ ol tagiĝis, atingis hispanan teritorion. Sed nek la unu nek la alia havis pasporton.

En Ciuta ili sukcesis havigi al si civilajn vestojn, kaj bonkora hispano ankaŭ donis kelkajn pesetojn. Baldaŭ ili atingis Laraŝ, proksime de la internacia zono. Tie ili disiĝis. Unu renkontis inteligentan arabon, kiu sciigis al li pri hispanaj polic-stacioj kaj kiel eviti ilin. Atinginte Arzila, li eniris kafejon, kie la ĉeestantoj, aŭdinte lian rakonton, faris monkolekton. Ankaŭ la kafejestro gastigis lin. Tie por la unua fojo depost sia foriro li kuŝis sur lito kaj ĝuis agrablan dormadon.

Sed antaŭ ol li atingis Tangeron, haltigis lin araba patrolo kaj demandis lin hispanlingve pri la paperoj. Feliĉe li kunportis sian anglan militservan dokumenton. La arabo rigardis ĝin kaj ŝajnigis, kvazaŭ li povus legi ĝin, kaj redonis ĝin ridante kun la angla vorto "Alright" (En ordo)! En Tanger li trovis la britan konsulon, kiu promesis sendi lin hejmen. La sekvantan tagon lia kunulo ankaŭ aperis, kaj ili enŝipiĝis al Gibraltaro. Ambaŭ laŭdas la arabojn, sen kies helpo ili certe ne estus atingintaj Britio n.

Komunikis (7471).

---

malŝateme ili parolas pri alilandaj samklasanoj. Patrioj ekzistas; dioj ekzistas. Atestas pri tio la kazernoj kaj preĝejoj. Sed la homoj kreis la patriojn kaj la diojn; ili sekve ankaŭ povas detrui ilin. Sufiĉas por tio, ke ili lernu pensi racie, ke ili senigu sian menson je ĉia senbaza mistikismo.

Al tio helpas la scienco, la senĉese malvolviĝanta tekniko. La produktofortoj mondskale aliiĝas, ampleksiĝas, unueciĝas; tial ankaŭ la menso de la homoj nepre aliiĝos kaj unueciĝos.

Dume la militoj restas la solaj rimedoj por krei ian provizoran ekvilibron inter la multaj nacioj, ĉar la mondo estas plenigita de patriotoj. Kiam eksplodas milito, kiam furiozas patriotismo, la racie pensantaj homoj povas nur provi per ĉiuj rimedoj savi sian vivon, se ne ekzistas ebleco aliiĝi la militon en revolucian batalon. Ne domaĝas, ke patriotoj mortigu patriotojn. Nur per batoj tiaspeculoj povas lerni pensi racie. En 1914, la patriotovolontulo H. Barbus kuraciĝis ĉe la fronto kaj fariĝis internaciisto. Oni povus citi multajn similajn ekzemplojn. Estas bone konate, ke la nekuraceblaj patriotoj troviĝis precipe ekster la fronto.

Kvankam la lasta mondmilito havis regresan karakteron, ĝi estis tamen sufiĉe instrua. Jam nun, eĉ en la burĝa reganta klaso aperas homoj, patriotoj, kiuj ekkonscias, ke la severa aplikado de la naciismaj principoj, la absoluta suvereneco de la ŝtatoj, ne plu povas akordiĝi kun la ekonomiaj leĝoj. Ili provas trovi kompromison inter la naciismoj. Tiel naskiĝis kaj disvastiĝas la internaciismo.

Tiu doktrino ĉefe varbas adeptojn en la laboristaj medioj; multaj partioj kaj sindikatorganizoj eĉ metis ĝin en sian programon. En la dua parto de ĉi tiu studo ni ekzamenos, ĉu la internaciismo liveras kontentigan solvon al la problemo.

E. Lanti.

(Fino de la 1-a parto.)

ENCERBIGENDAJ VEROJ

La kapitalistaro tenas en servuteco la Laboristaron. Kaj tia stato ĉefe rezultas el tio, ke la granda plimulto da laboristoj legadas la gazetojn eldonatajn de la kapitalistoj.

Kiam vi varbis unu abonanton al Sennaciulo, tiam vi pli utilis al la laborista esperanta movado, ol kiam vi disvendis dek lernolibrojn.

Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la neŭtrala esperanta movado signifas samproporcian perfidon al la SAT-movado.

La dek devoj de la sindikatano

La tasko de profesia asocio certe estus multe pli faciligata, se ĉiu sindikatano memorus jenajn dek devojn:

1. Estu bona sindikatano. 2. Pruvu bonan kamaradecon. 3. Pagu regule viajn kotizojn. 4. Ĉeestu la kunvenojn. 5. Partoprenu la manifestaciojn. 6. Dum kunvenoj kaj manifestacioj estu korekta. 7. Legu vian ĵurnalon. 8. Estu bona propagandisto. 9. Evitu la strikrompantojn. 10. Pelu la fidenuncistojn for de via proksimeco. Jen kelkaj rimarkigoj rilate al ĉiu devo:

1. Por esti bona sindikatano, sufiĉas plenumi ĉiujn cititajn devojn.

2. Por esti bona K-do, estas necese konservi bonajn rilatojn kun la sindikatanoj, ne ĉikani pro bagatelaĵoj kaj ne ĵaluzi al sia proksimulo.

3. Sindikatano, kiu regule pagas siajn kotizojn, faciligas sian taskon. Unue, restante en prokrasto, li ĉiam havos penegojn reguligi la pagojn. Due, li helpas la monkolektanton, kiu ne estas devigata diri al li: Pagu viajn kotizojn! Aŭ: Kiam vi estos ĝisdata? Tio ankaŭ faciligas la ordigon de liaj kalkuloj kun la kasisto, kiu tiel havas simpligitan laboron.

4. Ĉeesti la kunvenojn estas la plej bona esprimo de konfido al via komitato, kaj samtempe vi partoprenas la debatojn kaj havas tiel kontentecon helpi la bonan funkciadon de la sekcio.

5. Por montri la unuecon de la sindikatanoj, ili ŝuldas al si partopreni manifestaciojn ktp.

6. Por esti korekta dum kunvenoj, sufiĉas ĝenerale, ne tro trinki antaŭe kaj dume, kaj ankaŭ ne fari el diskutoj distraĵon. Dum la manifestacioj same, ne moki pri la homoj, kiuj rigardas vin pasantajn, ne kriegi kvazaŭ sovaĝuloj, fine esti digna en sia teniĝo kaj paroloj. Tiel oni akiras respekton.

7. Ne sufiĉas supraĵe legi sian ĵurnalon, kiel multaj faras, sed estas devo ĝin legi de la unua ĝis la lasta linio, ĉar ĉiuj artikoloj estas interesaj por bona sindikatano.

8. Sindikatano devas ĉiam esti propagandisto. Li ĉiam klopodu alvenigi novajn anojn en sian sindikaton. Tial ke legado de ĵurnalo estas bona propagando, do transdonu ĝin al nesindikatanoj.

9. Eviti la strikrompantojn signifas, ne familiare rilati kun homoj, kiuj absolute ne volas aliĝi al sindikato. Oni ne devas vivi kun ili amike aŭ kamarade, sed ilin flanke lasi.

10. Rilate al la fidenuncistoj, necesas agi same kiel al la strikrompantoj; tamen sentigu al ili vian malestimon. Eble tiu agmaniero devigos ilin pripensi, kaj ilia deziro fidenunci malaperos.

Vi povas vidi, ke la tasko esti bona sindikatano estas nek tre malfacila nek peniga.

(11 331)

TRA ESPERANTIO

Pri nia Vortaro

En la vivo de nia Asocio neniam iniciato trovis tiel bonan akcepton, kiel tiu pri eldono de Vortaro. Ĝis nun neniu kontraŭdiris. Ni nur ricevis aprobajn leterojn, proponojn pri kunlaborado, konsilojn, sugestojn ktp. Al ĉiuj ni sincere dankas kaj ĝojas, ke tiom da kompetentaj personoj konsentas helpi al ni.

Ĉiuj kompreneble volas, ke nia Vortaro estu kiel eble plej kompleta. Kelkiuj eĉ deziras, ke ĝi estu ilustrita. Ni ankaŭ havis tiun deziron. Tamen ni rezignis pro du ĉefaj motivoj: 1. La preparado de tia verko estus tre multekosta kaj niaj monrimedoj estas limigitaj; 2. Tia Vortaro estus tro kara, por ke ĉiuj laboristoj povu ĝin aĉeti.

Ni devos dum kelkaj jaroj prokrasti la eldonon de ilustrita enciklopedieto esperanta, kiel ni unue intencis fari. Necesas unue, ke la esperantistaro plinombriĝu, ke niaj vicoj plidensiĝu. Plej bone planita entrepreno povas fiaski, se ĝi okazas ne ĝustatempe.

Oni ne estu tro postulemaj; ni estu praktikaj homoj kaj permesu al ni nur anticipi en la kampo de la ideoj.

Dume ni denove alvokas al la kunlaborado kompetentulojn el ĉiuj lingvoregionoj. Kaj por ke oni povu tuj eklabori, ni publikigas ĉi-sube liston da vortoj, pri kiuj ni deziras ricevi ĉu dijinojn ĉu rimarkojn aŭ atentigojn. La t. n. internaciaj vortoj konsistigas eble la plej malfacilan taskon en nia laboro. Vortoj grafisme (skribe) internaciaj tute ne estas tiaj laŭsence. Por ke oni pli bone komprenu, ni citu konkretan ekzemplon: Ĉu la vorto n o t a r i o *havas tute la saman sencon en ĉiuj lingvoj? t. e.: ĉu la taskoj kaj rajtoj de tia leĝisto estas la samaj en ĉiuj landoj? Kredeble ne. Tial ni petas, ke oni havigu al ni kiel eble plej da klarigoj pri tiaj vortoj.*

Ĉiu sincera esperantisto havas la devon helpi al ni en nia sufiĉe delikata kaj grava entrepreno. Interesatoj, ne prokrastu en via bonvola kunlaborado.

Advokat' afekci' agent' akademi' apologi' asesor' asist' asistant' avanc' benefic' bil' binokl' brav' brokant' dekan' demonstraci' dispozici' docent' doktor' ekonom' ekspres' emancip' etiket' faktor' faktur' feri' flagr' formal' galanteri' garnitur' grund' harmonik' instituci' institut' intendant' invest' kancelari' koleg' kolegi' kolport' komandit' komandor' komisar' konfekci' konfer' konferenc' konskripci' konsul' kontribuci' kurator' legitim' legitimaci' lektor' lojal' lunatik' magistr' magistrat' manifest' manifestaci' merkat' nekrolog' nekrologi' notari' opoz' patent' pedant' percept' ponton' prefekt' profesor' prokuror' prokurator' promoci' provos' radikal' redaktor' refer' referat' referendari' referenc' referent' regi' registrator' (Z) reklamaci' rekogn' rekvizici' reviz' revizor' sekretari' seminari' serĝent' sindik' ŝose' temperament' teren' valut' verv' vikari'.

* * *

Ni rememorigas, ke la prezo de nia Vortaro ne superos 7 germ. markojn. Ĉiu, kiu antaŭpagos du ekzemplerojn antaŭ la 15-a de julio, tiu ricevos t r i *ekzemplerojn. Kunlaboru ankaŭ mone! . . .*

DIREKCIO DE SAT.

Pli da modesteco decus

En la n-oj 186/187 de "S-ulo" troviĝas artikolo: "Trimil tricent sepdek naŭ tagoj el mia vivo." La unua parto tre interesis min; kolerigis min la dua, en kiu la aŭtoro malŝate parolas pri la libro: EKLUMO EN LA ABISMO. Estas preskaŭ dirite en la artikolo, ke Barbusse verkas i d i o t e. Oni ja havas la impreson, ke K-do T. Tordarson ne nur atakis la stilon, sed ankaŭ la enhavon de la libro. Li deziras ŝajnigi sin supera al la tuta esperantistaro, dirante: "Bedaŭrinde multaj esperantaj libroj, gazetoj kaj revuoj ne prezentas efektive bonan kaj a m u z a n s t i l o n." Nu, ĉu por SAT-organo decas amuzaĵoj? Mi ankaŭ kelkfoje bedaŭris, ke kelkaj libroj eldonitaj de SAT ne estas tiel bonstilaj, kiel estas redaktata nia gazeto. Sed kritiki tiom senindulge la stilon de tiu speciala libro, estas en miaj okuloj nur enviema blufo. Mi proponas enketi ĉe la legintoj de la libro, kiom da ili ne komprenis ĝian enhavon. Mi firme kredas, ke estas tre malmultaj, eble nur K-do T. T. (7604). Mi estis komencanto en esperanta legado, kiam mi legis la ŝatatan libron, tamen mi sufiĉe bone komprenis ĝian enhavon; kaj tiu bravulo provis trifoje sensukcese?! . . . Ekzistas bone ĝojiga (eĉ amuza) literaturo, sed estas pli valore elmontri kaj rememorigi al la proletjunularo la terurajn rezultojn, kiujn produktas la nuntempa sociordo.

(8070)

R e d N o t o : Ĉi-okaze ni sciigu, ke la tradukinto de "Eklumo en la Abismo" estas tre malnova esperantisto, n e SAT-ano. Laŭ siaj diroj, li penis konservi de la aŭtoro la stilon, kiu ankaŭ ne estas en la originalo tre facile komprenebla.

La plej nova kajero de

Sennacieca Revuo

Edukada Serio **Majo 1928**

aperis sub la ĝenerala titolo:

GEPATROJ BABILAS KUN EDUKISTOJ

ENHAVO:

Redakcia Angulo. — *SAT-ano 357:* Kion bezonas la gepatroj de nia Sennacieca Popolo. — *D-ro Liber:* SAT-gepatroj ne eraru . . . — *M. Boubou:* Tri SAT-anoj memoras . . . aŭ la problemo pri korpopunoj. — *Schneller:* La gepatraj konsilantoj en Saksio. — *Kurt Hubricht:* Al ateisma edukado. — *SAT-ano 518:* Al sennacieca edukado. — *Gr. Fiĥij* (trad. *Ivn*): Rakonto al SAT-anidoj, kiel aritmetiko revoluciigis la junulon. — *Célestin Freinet:* Internacia klopodo por Kino lerneja.

K-doj! Nia Revuo perdis ĉe multaj bedaŭrinde la konfidon pro sia neregula aperado en la pasinteco. Multaj legantoj pro tio malabonis ĝin, esprimante sian tediĝon. K-doj! La tri lastajn n-ojn vi ricevis ĉiumonate akurate, sen ia prokrasto. Ni garantias al vi ankaŭ por la estonto la akuratan liveradon. Montru al nia Revuo ree vian konfidon, abonante ĝin kaj varbante novajn legantojn, por ke ĝi estu memstare vivkapabla kaj ne plu bezonu alpagojn el la SAT-kaso!

Mendu ĉe Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Jarabono: 4 mk. g., por membroj de SAT 3 mk. g.

8-a Kongreso de SAT
en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

10-a komuniko

Aliĝu. Aliĝilon kaj kotizon oni sendu al la supra adreso. Sovetiaj K-doj pagu al Centra Komitato de SEU, poŝtkesto 630, Moskvo. Germanianoj povas sendi al: K-do R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germ.

Kotizo: Por SAT-anoj egala al jarkotizo de SAT. Ne-SAT-anoj pagas 1½-oblon de la SAT-jarkotizo.

Sovetianoj. Klopodu plej baldaŭ pri pasportoj. Kiam vi havos vian sovetian pasporton, vi devos tuj peti vizon ĉe la sveda ambasadorejo en Moskvo.

Ĉiuj kongresanoj aranĝu, ke ili en frua tempo alvenas Göteborgon. Plej bone estas, ke vi venu jam la 12-an aŭ 13-an. Kiuj povas, alvenu pli frue. Memoru, ke la malferma kunsido okazos la 14-an, k estas tre grave, ke ĉiuj jam estu instalitaj.

Kongreskartojn ni sendos al ĉiuj aliĝintoj dum junio.

La brita karavano forveturos de Londono je la 7-a horo la 11-an de aŭgusto k trairos Harwich, Esbjerg k Kopenhagon. Pro rabato la kosto estos £ 7-14-0 por ir-reira bileto (la duono por ira bileto). Sed por havi la rabaton, ĉiu ano devas antaŭanonci sin al la organizanto K-do Mark Starr, 25 New St., London S. W. I.

Tramvojistoj. La tramvojistoj-esperantistoj de Göteborg proponis aranĝon de tramvojista fakkonferenco. Ili invitas kolegojn ĉiulandajn. Skribu al Nils Tobiasson, Färjaregatan 2, Göteborg.

Provizora Tagordo
de la oficialaj kunsidoj ĉe la 8-a Kongreso de SAT, Göteborg (aŭgusto 1928)

a) Raporto de la Ekzekutiva Komitato pri la ĝenerala gvidado dum la interkongresa jaro
b) Raporto de la Administracio
c) Raporto pri "Sennaciulo"
d) Raporto pri "Sennacieca Revuo"
e) Raporto pri "La Lernanto"
f) Raporto pri la SAT-Gazetservo
g) Debato pri eventualaj ŝanĝoj en la statuto
h) Debato pri la projekto de SAT-programo
i) Diversaj temoj kaj demandoj.

La 7-a listo de aliĝintoj

221	A.Sheldon, Cheshire, Anglio . .	4301
222	J. E. Ewans, Cheshire, Anglio .	9411
223	G. Östling, Ludvika, Svedio . .	
224	Erland Holmqvist, Gefle, Svedio	
225	Valfrid Adamson, Gefle, Svedio	
226	Kurt Graube, Göteborg, Svedio	
227	Isaak Krolik, Smolensk, Sovetio .	7610
228	Viktor Ekström, Boras, Svedio .	12 439
229	Esk. Johansson, Eskilstuna, Sved.	
230	Anna Greta Johansson, Eskilstuna, Svedio	
231	Bogdano Hajrapetjan, Teheran, Persio	
232	Zaragoza SAT-grupo, Zaragoza, Hispanio	
233	Dorothy Ekie Luker, Staffs, Anglio	8502
234	N. G. Nilsson, Göteborg, Svedio	
235	Artur Wenzel, Wurzen, Germanio	1223
236	Kurt Grande, Wurzen, Germanio	
237	Rudolf Anderberg, Wallsjö, Sved.	
238	Curt Kjellström, Ödeshög, Sved.	
239	Almida Zetterlund, Stokholmo, Svedio	
240	Otto Elze, Halle, Germanio . .	5312
241	V. Svistunov, Moskvo, Sovetio	
242	K-do Gurov, Moskvo, Sovetio .	
243	Nikolao Matjas, Smolensk, Sov.	6424
244	Jeleznjakov, Samara, Sovetio .	
245	Else Gössner, Leipzig, Germanio	4292
246	Karl Riese, Leipzig, Germanio .	347
247	K-do Konrad, Auerbach, Germ.	
248	K-do Kastov, Narofominsk, Sov.	
249	K-do Antipov, Novorossijsk, Sov.	8245
250	K-do Nikšić, Buenos-Aires, Arg.	

Sekvantaj organizoj elektis oficialajn delegitojn al nia 8-a

Tutsveda Marista Unio: Oscar Danielsson kaj Vallentin Eliasson, Göteborg.

Tutsveda Fervojista Sindikato: Ernst Eriksson kaj John Sjöholm, Stokholmo.

Loka sindikata grupo de lokomotivestroj en Ludvika: E. Holmström.

Loka grupo de metalistoj en Ludvika (600 membroj): E. Lundin.

Librobindista Sindikato de Stokholmo: Tor Solander, Stokholmo.

Loka grupo de fabriklaboristoj en Sm. Anneberg: Eskil Henriksson.

Loka sindikato de elektristoj en Trollhättan: Thorwald Hasslöf.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

BULGARIO. La ministerio de popola klerigado (?!) nuligis ĉiujn esp. societojn el lernantoj k deklaras kiel "kontraŭpatrian agon" la lernadon de esp-o. Estas ordonite, fermi la ekzistantajn esp. kursojn por lernantoj, kiuj eĉ ne rajtas ricevi neŭtralajn esp. gazetojn. La ricevado de "S-ulo" estas laŭleĝe malpermesita, k la ricevanto estas konsiderata kiel kontraŭŝtata krimulo. — **ESTONIO. Tallinn.** La Lab. Esp. Soc. daŭrigas sian laboradon. Okazis kelkaj kursoj, sekve de kiuj novaj anoj aliĝis al la societo kaj al SAT. Aperas murgazeto; dum la kunvenoj iafoje funkcias viva gazeto. La societo havis en la fino de la jaro 39 anojn, inter ili la gvidanton de la estonia laborista movado, K-don Grimpel. La societo havas senpagan ejon en la Laborista Domo. Ĝi posedas 120-libran bibliotekon. "S-ulo" estas elmetata en la komuna legejo de Lab. Domo por ĉies uzado. — La SAT-anoj ofte renkontiĝas dum la kunvenoj de LES, ĉiumerkrede; tamen de post nov. okazas regulaj kunvenoj de la SAT-anoj ĉiudumonate la 1-an dimanĉon en monato je la 16-a h. en Lab. Domo. Dum ili oni diskutas pri SAT-demandoj, akceptas novajn anojn ktp. Ĉiuj SAT-anoj, ankaŭ alilokaj, estas invitataj partopreni ĉi tiujn kunvenojn. — En aprilo K-do Kirikal paroladis en la profesia unuiĝo de presistoj pri la signifo de intern. lingvo por la Laboristaro; komenciĝis kurso. — La unuamajan manifestacion LES partoprenis kun sia bela granda standardo, kiu vokas esp-e: "Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!" — **POLIO. Lodz.** Ĉe Polia Liberpensula Asocio 28. 4. K-do 7076 parolis pri "Unuamajo kaj esp-o". Rezulto: dua kurso kun pola instrulingvo k 26 gelern. 2 kursoj (kun juda kaj germ. instrulingvo) finiĝas. La kursojn gvidas la sama K-do laŭ "Petro". Krome lodzaj SAT-anoj gvidas ankaŭ privatajn kursojn. — **Pabianice** (apud Lodz). Ĉe Polia Liberpens. Asocio 1. 5. K-do 7076 parolis pri "Intern. Tago k esp-o". Rezulto: kurso kun pola instrulingvo k 20 gelern. Gvidas la sama K-do laŭ "Petro".

* * *

La Internacia Antimilitarista Oficejo en Hago, Laurierstraat 125 (Nederl.), preparas la eldonon de propaganda broŝuro pri la principoj, celoj k agado de l' Oficejo en div. lingvoj, ankaŭ en esp-o.

Ĉe la neŭtraluloj

Al la 20-a neŭtrala esperantista kongreso, kiu okazos dum aŭgusto en Antverpeno, aliĝis ĝis nun pli ol 400 personoj. La protektanto de tiu kongreso estos la belga reĝo Alberto!! . . .

La esp. unuiĝo de saksaj instruistoj aranĝis okaze de ĉefkunveno de Saksa Instruista Asocio en Chemnitz fakkunvenon, en kiu oni raportis, ke oni nun en 42 lernejoj de saksaj urboj k vilaĝoj instruas esp-on, parte kiel devigan, parte kiel fakultativan fakon. La membrolisto de saksaj esp. instruistoj enhavas nun 300 nomojn. La saksa ministerio por popolklerigo dufoje pasintjare monsubtenis la societon, tiel ke oni povis realigi 15 kursojn por gekolegoj.

ĈE LA TRAMVOJISTOJ

En Stokholmo depost duona jaro ekzistas kursoj inter la tramistoj. Ankaŭ la estraro havas simpatiojn por esp-o. 5 tramvojistoj nun ricevis stipendion por fari vojaĝon eksterlanden k studi la tramajn aferojn en diversaj lokoj. Inter ili estas unu esp. K-do Joh. Karlsson, Spärvägen, Rasunda, kiu entreprenos sian studvojaĝon la 8. junio. Li haltos unue en Berlino dum du aŭ tri tagoj, poste en Dresdeno, Praha k Vieno. Li atendas, ke la kolegoj parolantaj esp-on en tiuj urboj, helpos al li en studado, por ke lia raporto estu bona propagando por esp-o.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Vo-Ko, Esperanto-Eesti Sonastik (esperanto-estona vortaro). Eld. M. Tamverk & Pojas, Tallinn, 1927. 240 pĝ. Tiu ĉi estas unu el la plej ampleksaj esp.-nacilingvaj vortaroj k entenas sur relative malgranda spaco amasegon da vortoj k terminoj, i. a. grandan nombron da medicinaj, botanikaj, matematikaj, geologiaj k alisciencaj esprimoj, kiujn la ordinaraj vortaroj por komuna uzo ne entenas. Kelkaj signoj klarigas, kiuj vortoj estas oficialaj k fundamentaj. La aŭtoroj utiligis por la kompilado ĉiujn gravajn esp.-nacilingvajn vortarojn. Ilia laboro meritas laŭdan mencion. N. B.

Elie et Elisée Reclus. Eldonis franclingve "Le Semeur". Formato: 19/28 cm. 64 pĝ. Prezo: 3 fr. fr. Havebla ĉe P. Larivière, 14, rue des Lions, Paris (4-e). — Tiu ĉi volumeto konsistas el kolekto da artikoloj de diversaj aŭtoroj pri la familio, vivo k verkado de tiuj du famaj scienculoj k anarkistoj. Portretoj k diversaj ilustraĵoj de P. Larivière (eks-SAT-ano) aldonas plaĉon al la enhavo k faras la tuton tre rekomendinda al ĉiuj franclingvanoj.

J. Sakurada: Meĥanismo de sapiĝo de celulozesteroj de altaj fatacidoj. N-oj 132 ĝis 134 de Scientific Papers of the Institute of physical and chemical research (Sciencaj eldonoj de la Instituto por fizika k kemia esploroj). Tokio, 28. 2. 1928. 64 pĝ. Prezo nemontrita. Scienca artikolaro (revuforme) nur en esp-o (kun kelkaj germanl. resumoj). Tiu eldono pruvas la utilon de esp-o por la intern. scienco, bone komprenatan de la japana sciencularo. N. B.

Internacia Proleta Korespondo. Adreso: Toŝio. Otaguro ĉe "Inprekor", Tokio-ŝi-gai, Tozuka-maĉi Genbeĉo 12, Japanio. N-o 1. Marto 1928. Tiu ĉi nova gazeto aperas en japana k esp. lingvoj, dufoje ĉiumonate

(abonprezo de marto—dec.: 3.80 jenoj, de majo—aŭg. 2.20 j.). Por montri la gravecon de tiu entrepreno, ni citu nur jenon: "Ni japanaj proletoj ekeldonas "Inprekor" (Internacia Prol. Korespondo). Kvankam nun jam estas eldonataj "Inprekor", "Komintern" en Germanio k Anglio, "Internacional" en Japanio k ili estas aranĝitaj nur en propraj naciaj lingvoj, kiuj estas tre malfacile studeblaj por ni proletoj, nia "Inprekor", okaze de granda disvastiĝo de esp-o, deziras utiligi la lingvon intern., por ke niaj K-doj de ĉiuj landoj povu facile legi." N. B.

E. Adamson, Sub ruĝaj standardoj. Impresoj k travivaĵoj en Sovetio. Eld. Sveda Esp. Oficejo, Box 73, Göteborg (Svedio). Prezo 0.75 kr. sv. 40 pĝ. dukolora kovrilo, broŝ. Formato 16×23 cm. — Tiu broŝuro varbas ne nur por Sovetio, sed estas samtempe bona poresperanta propagandilo. Sur ĉiu paĝo de la libreto evidentiĝas, ke neniu alilanda vojaĝanto tra Sovetio (escepte se li scipovus la rusan lingvon) povus utiligi iom simile larĝe la restadon k studadon en la lando, kiel esp-isto. Kiel la aŭtoro esprimas en la antaŭparolo, li dediĉas la broŝuron al la sovetia esp-istaro kiel dankon por ilia bonkoreco k vera kamaradeco. La priskribo estas riĉe ilustrita k viveca. La lingvo estas bona. Cetere tio ne mirigas, se ni legas enkonduke, ke lertaj sovetiaj esp. K-doj kiel Nekrasov, Nikolskij k. a. trarigardis la manuskripton. Ĝi estas, resume, tre valora propagandilo, kiun havigu al si ĉiuj K-doj. — N. B.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Tagblatt, Linz, 21. 4., Krizo en la ora lando (183); Le Mutilé (Militviktimo), Paris, apr., Oni petas volontulojn; L'Effort, Lyon, 15. 3., Faktoj k kom. (178); Le Métallo, St. Etienne, 1. 2., Sind. mov. en Norv. (159), Le Syndiqué du Centre, Bourges, feb., El Hung. (173); De Tribune, Amsterd., 29. 2., Lab-isto Saviĉev en kuracloko, 8. 3., Tago el mia vivo (Nesvitajlo); Tagblatt, Linz, 17. 3., Virino en Persio, 26. 3., El Estonio, 6. 4., Klasbat. en Jap. (177), 28. 3., En Japanio (179), 17. 3., Kiel oni min helpis dum malsato, 23. 3., Negra lab. mov. (170), 7. 2., faŝismo en Meks. (170), 7. 2., El sendep. Estonio, 6. 2., El Portug., 14. 12. 27, El sendep. Irlando, 10. 2., Vizaĝkovrilo (Parantecha).

Represis el "S. R.":

Tagblatt, Linz, 1. 5., Situacio de prol. infanoj en Jap. k Ĉinio (marto).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Naŝa gazeta (Nia gazeto), Moskvo, 1. 5. (alvoko en esp.); Accion Cooperatista, Barcelona, 11. 5.; Mysl, Varsovio (liberpens. gaz.), 7. 5. (pri peresp. enketo); Krasnoje Ĉernomorje, Novorossijsk, 5. 5.; Trudovoj Putj, Armavir, 6. 5.; (pri FEO-kongr. en Bourges:) Le Peuple, Paris, 12. 4., Le Républicain, Orléans, 14. 4., La Dépêche, Bourges, 11. 4., Le Syndiqué du Centre, Bourges, apr., L'Émancipateur, Bourges, 15. 4., L'Impartial du Centre, Bourges, 12. 4.

Peresper. artik. k leterojn presis:

Leninec, Rostov, 1. 5.; Krasnoje Znamja, Taganrog, 5. 5.; Krasnoje Ĉernomorije, Novorossijsk, 6. 5.; Niĵegorodskaja Komuna, 1. 5.; Isvestija, Odessa, 1. 5., 6. 5.; Juna Gvardio, Odessa, 1. 5., 6. 5., Sächs. Arb.-Ztg., Leipzig, 10. 5.; De Tribune, Amsterd., 25. 4., 1. 5.; De Naturvriend (naturamiko), A'dam majo; Tagblatt, Linz, 11. 4.

Pri la SAT-kongreso:

The Bournemouth Times, 11. 5., aperigis bonege aranĝitan detalan raporton de nia K-do Stay.

NIA POŜTO

5129. — La proponoj de la E. K. de SAT por solvi la problemon rilate al la por- k per-esperanta laboro, ne signifas, ke ni volas iel ajn trudi ilin perforte. La Estraro de SAT certe akceptos la dicidojn farotajn en Göteborg. Sekve vi devus direkti vian artikolon ne al "S-ulo", sed al "D.A. E." por tie influi sur la G. L. E. A.-anojn.

9425. — Ne, ni ne aperigos viajn artikolojn: 1. tial ke en Polio jam ekzistas Lab. Esp. Asocio; 2. tial ke SAT ne estas kom. organizo, sed nur superpartia, kulturcela. Per viaj senpripensaĵoj vi nur povas helpi al neŭtraluloj en ilia disfamaĉo, ke SAT estas danĝera asocio, kiun la registaroj devas malpermesi. Tion ili jam atingis en pluraj landoj, ĉu vi deziras ankaŭ la samon en Polio?

Pol. Lib. Asocio. — Ni ne povas malŝpari lokon por disputo, kiu interesas nur poliajn K-dojn. Vi devas solvi tiun aferon en la kadro mem de la Lab. Esp. Societo.

5448. — Al via aroganta letero mi respondas ĉi tie. 1. Via postulo pri tuja respondo povus iel esti pravigita, se vi aldonus respondkuponon. Via "Tago" kun via foto aperos siavice. Aliaj K-doj sendis similajn artikolojn antaŭ vi k senriproĉe atendas sian vicon. Notu bone en la memoron, ke trudemo neniel povas efiki sur nin malobei al niaj gvidprincipoj. 2. Vian dramtradukaĵon vi devus sendi al Odessa, kie sidas la Literatur-Komisiono de SAT, ne al ni. Via postulo pri tuja eldono estas... amuza! 3. Ni dankas pro viaj bonaj pristilaj konsiloj k ĝentile petas, ke vi unue atentu ilin; vi ankaŭ tre helpus al ni, se vi skribus legeble. — E. L.

5448. — Via pk. de ?-a de apr., enhavanta kronikaĵon, estas absolute nelegebla. Indulgu niajn okulojn k klopodu skribi legeble.

10 439. — Ni ne komprenis la enhavon de via anekdoto. Unue ellernu la lingvon, antaŭ ol verki.

Iuelmultiuj. — Ni ne komprenis la signifon de "kunveturo" en la senco de vi uzita. Sekve ni devis supozi, ke ankaŭ niaj legantoj ne komprenos. Tial ni ŝanĝis la esprimon. Cetere, oni ne povas fidi al nacilingvaj vortaroj en tio, ĉar ili kelkrilate estas malperfektaj.

11 899. — Via artikolo entenas tro da vortoj k frazoj, kies precizan sencon ni ne sukcesis eltrovi; sekve ni ne povas korekti k utiligi vian skribaĵon. Vi certe povos akiri fundan konon de nia lingvo, sed necesas, ke dum kelka tempo vi ĝin ellernadu.

11 325. — La senditaj versoj estas sufiĉe bonaj, eĉ presindaj. Sekve ni okaze uzos la unu aŭ alian, k vi povos kuraĝe daŭrigi verki poemojn, ne riskante fiaski. Sed estu singardema, ne kreu artefarite, sed laŭ interna emego, kiam vin vokas la "muzo".

11 753. — Via lasta art., same kiel la unua, estas absolute nekomprenebla, ĉar vi ne konas la gramatikon. Sekve ellernu unue funde la lingvon, k nur poste komencu verki ion. — Red.

10 608. — Via anonco kostas 3 rubl.
Adm.

ATENTU!

Sebastopola Soveto de Sindikatoj dez. seriozan k. daŭran koresp-adon kun profesiorganizoj de ĉl. pri metodoj de profesilaboro, pri ekonomia k. kultura priservado de membroj. Resp. garantiata. Adr.: **Sebastopolo, Dvorec Truda, Rajprofbjuro.**

ISK

Internacio de Socialista Kunbatalo

La politika revuo por la klaskonscia laboristo

Ĝi aperas monate kaj pritraktas ĉiam aktualajn problemojn de l'klasbatalo montrante la veran karakteron de la kapitalismo kaj la necesajn paŝojn por forigi la ekspluatadon. — Tiu ĉi revuo estas gravega batalilo por niaj socialistaj ideoj kaj devas esti abonata de ĉiu aktiva K-do.

Abonprezo kvaronjare nur 0,60 mk. g. Provekzemplerojn vi senpage ricevos de

"ISK"-Expedition, Schlüchtern Nr. 4 (Bez. Kassel), Germanio

Helpu K-doj! La esperanto-kursanoj de Pirmasens aranĝos la 20. 6. 28 letervesperon. Ni petas la tutmondajn Gek-dojn sendi al ni L, PK, PI bfl. pri ĉ. temoj. Resp. gar. Adr.: Richard Göttel, Christiansgasse 8, Pirmasens (Pfalz).

ENHAVO:

	paĝo
Fortigu nian Eldon-Kooperativon!	279—80
Pri utopia romano	280
"Dua Manĉestr"	280—81
Vojaĝaj impresoj el suda Ameriko	281
Fervojista senlaboreco en Samara	281—82
Pri instruado en Polujo	282
Tago el mia vivo	282
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo	282—83
Forkuro el la "fremdula legio" . .	283
La dek devoj de la sindikatano	283
Tra Esperantio	284—86
Anoncoj	286

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)